# LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.

ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO


## ĈU EKZISTAS VIVO SUR LA PLANEDO MARSO?

Kiam la astronomoj dum la longaj, serenaj noktoj direktas siajn teleskopojn por rigardadi la misteron de tiu ruĝbrila planedo, kiom da maltrankvilo kaj kiom da demandoj tiam trairas ilian menson. Ĉu Marso posedas atmosferon? Kian konsiston ĝi havas? Ĉu tiuj grandaj, verdaj vastaĵoj, kiujn oni ekvidas sur la supraĵo de tiu mondo al ni tiel proksima, konsistas el vegetaĵoj? Ĉu eble ili estas arbaroj, herbejoj aŭ verdiĝantaj ebenaĵoj? Ĉu tie ekzistas ankaŭ animaloj, similaj al niaj teraj specoj?

Ĝuste por respondi al tiuj kaj al aliaj demandoj, la astronomoj intensigas la genian akrecon de siaj observadoj. La plej malgranda makulo estas ĉiel rigardata kaj analizata laŭ streĉa klopodo por fine malkovri la sekretojn de tiu mondo, kiun la ĉielaj movoj kelkfoje alproksimigas al ni ĝis 56 milionoj da kilometroj.

Per mezforta teleskopo oni vidas Marson sepoble pli granda ol la luno, observata nudokule. Tial estas facile kompreni, kial oni povas vidi tiom da detaloj sur tiu proksima tero, frato de la nia.

Laŭ distanco de la suno Marso estas la kvara planedo, kiu venas tuj post la tero. Ĝia diametro estas preskaŭ la duono de tiu de la Tero. Ĝia meza distanco de la suno estas 228 milionoj da kilo-

metroj. La suna lumo bezonas 12 minutojn kaj 32 sekundojn por alveni sur Marson. Ankaŭ tiu ĉi planedo turniĝas ĉirkaŭ sia akso, kiel la Tero, en 24 horoj, 37 minutoj kaj 32 sekundoj. Ĝi havas du satelitojn (lunojn). Sur Marso jaro daŭras 687 tagojn. Ĝia meza rapideco estas po 23. 880 kilometroj sekunde.

Je la 5-a de septembro de la jaro 1877-a Marso prezentis sin en la plej bonaj observadkondiĉoj, kun diska diametro de 25". Schiaparelli, la direktoro de la observejo en Milano profitis tion por fari trigonometran kontrolon je la plej gravaj punktoj de la planedo. Tiu astronomo, kiu dediĉis grandan parton de sia aktiveco al la studoj pri Marso, trovis, ke oni vidas la planedon sulkita de kanaloj, kiuj kiel rektaj linioj estas disigitaj sur la tuta supraĵo.

Iliaj longecoj estas diversaj, nome de unu ĝis kvinmil kilometroj. Sekve oni povis kontroladi, ke tiuj kanaloj, je kelkaj epokoj, duobliĝas en paralelaj akvofluoj.

Pluraj astronomoj asertas, ke la kanaloj de Marso estas artefaritaj kaj fositaj de la loĝantoj por krei sistemon de irigacio.

Fakte multaj opinias, ke la akvo estas nesufiĉa kaj dum la neĝfandiĝo en la printempo tiuj ĉi kanaloj servas por ĝusta disvastiĝo.

Sur la polusoj de Marso oni fakte vidas du blankajn kovraĵojn, kiuj vastiĝas kaj malvastiĝas laŭ la alternado de vintro kaj somero.

La ĉeesto de vegetaĵa vivo sur Marso devigas nin, pro analogio, akcepti ankaŭ la ekzistadon de animala vivo. Certe rekta pruvo pri tiu animala vivo ne ekzistas, sed la aspekto de la artefarita irigacio ŝajnas laŭ la amerika astronomo Lowel kaj aliaj la plej bona pruvo, ke sur la planedo Marso loĝas pensantaj estaĵoj. Plue oni sur Marso vidas rondajn makulojn, kiuj ŝajnas loĝataj centroj, kaj rektajn liniojn, kiuj havas la aspekton de ligantaj vojoj. Tiu ĉi stranga geometrio laŭ Lowel estus la ŝlosilo de la solvo.

Marso, pli malgranda ol la Tero, fakte estus pli evoluinta kaj la loĝantoj estus pli progresemaj ol ni. Por inĝenieroj estus bagatelo projekti akvokanalojn longajn eĉ 5000 kilometrojn sur planedo, kie la laboroj estas grave helpataj de la malpezeco de ĉiuj materialoj.

La plej akurataj observadoj konvinkas nin, ke tuj post la fandiĝo de polusa kovraĵo ĉiuj sur Marso eklaboras: la akvo, kiu estas tiom malabunda estas tuj kolektata kaj fluigata tra kanaloj. Oni ne scias, per kiu meĥanismo ĝi atingas rapidecon de 80 kilometroj tage.

Sed kvankam ni ne vidas pumpilojn, nek maŝinojn, nek eĉ la

grandajn laborojn, kiujn la loĝantoj de Marso devus plenumi por estigi la irigacion de unu duonsfero en la daŭro de 52 tagoj, ni tamen povas esti certaj pri la rezultatoj. Kaj tiuj rezultatoj ekzistas sen eĉ minimuma dubo. Laŭ la antaŭenfluado de la akvo la loĝantoj laŭlonge de la kanaloj malfermas siajn kluzojn kaj irigacias la kampojn, herbejojn kaj terkulturaĵojn. Sur la bordoj de la artefaritaj riveroj la tuta vegetaĵo reviviĝas, kion oni bone povas ekvidi per la teleskopoj.

Estas neeble ke la naturo per si mem povus plenumi tiujn laborojn. La naturfortoj ne povas fosi rektliniajn kanalojn sur tiom vasta etendaĵo por transporti la akvon de la polusoj al la ekvatoro. Per si mem la naturo ne ekhavus la ideon projekti tiujn ĉi kolosajn laborojn por ebligi vegetaĵan kaj animalan vivojn sur mondo mortanta pro soifo.

Kvankam la scienco kaj la tekniko klopodas perfektigi la optikajn instrumentojn, ni ne vidos la loĝantojn de Marso. Ni deduktas ilian ĉeeston el la gigantaj laboroj, kiujn ili faras por ekspluati la hidraŭlajn rezervojn de sia planedo. El la efektoj ni deduktas la kaŭzojn.

Se oni esceptas la loĝantojn sur Marso, neniu estas kapabla klarigi la misterajn fenomenojn, kiujn oni observas sur tiu, al ni proksima, mondo.

Do tute probable Marso troviĝas en stato, kiu formas la mezon inter tiu de la tero kaj tiu de la luno kaj la fenomenojn, kiujn ni vidas, eble estas la lastaj manifestacioj de estingiĝanta vivo. Tie supre la tempo malrapide plenumis sian faraĵon: estas la anastezio de la malvarmo, kiu endormigas la planedon Marso kaj dolĉe kondukas ĝin al la morto.

Tiel inter ĉiuj planedoj, kiuj formas la korteganaron de la Suno, nur la Tero kaj Marso havus la privilegion gastigi vivantajn estaĵojn. Sed dum la vivo sur la Tero estas ankoraŭ plena, sur Marso la klimataj kondiĉoj kaj la maldenseco de la atmosfero sufokas la lastajn sopirojn.

Tamen tiujn, kiuj en la fenomeno de la Vivo vidas ekskluzivaĵon de nia Tero, ni atentigas, ke estas absurde opinii, ke ĉiuj mondoj, kiuj miliardope formas la amplekson de la Universo, estus efektive neloĝataj dezertoj. Kaj neniu logike povas pensi, ke nur nia suno havas en sia korteganaro Teron, kiu gastigas sur sia supraĵo la dian mirindaĵon de la Vivo.

Ettore Dominici.

El la itala revuo „La Scienza del Popolo", Torino n-roj 3-4/1949, trad. Giacomo Rose, Trieste.

Jam longe antaŭ la alveno de la francoj, eĉ antaŭ la araba konkerado, Tunizio prosperis sub la roma jugo. La stampo de la roma ĉeestado esas sufiĉe forta, ĉar eĉ nun ekzistas el tiu malproksima epoko ankoraŭ multaj imponaj postsignoj en la formo de grandiozaj monumentoj. La romanoj plenumis tion ne pro filantropio, sed male, por plene satigi sian malamon kontraŭ Karthago kaj precipe por proprigi al si la riĉajn tuniziajn ebenaĵojn.


En la jaro 146 antaŭ Kristo la roma generalo Scipion Emilius obstine sieĝis Karthagon kaj por iom ŝerci li igis la loĝantojn malsategi per severa blokado.

La Karthaganoj estis devigataj manĝi unue la kirasitajn elefantojn de la nacia armeo kaj fine ĉiujn katojn, hundojn kaj ratojn. Tiam la Scipiona armeo impete atakis la urbon, kiu fine kapitulaciis post unu semajno de stratbatalado.

Ĉiuj karthagaj soldatoj tuj estis ekzekutataj laŭ la plej sagacaj torturoj: Emilius ja estis delikatulo!

Sed oni lojale devas konfesi, ke la romanoj estis ankaŭ grandaj organizantoj. Ili firme klopodis estigi brilan prosperon en Tunizio (tiam nomata „Terra Africa"). De tiu giganta kaj ampleksa entrepreno postrestas superaj ruinoj.

La unuan problemon, kiun la romanoj sukcesis solvi, estas la kapto kaj la distribuo de la akvo. En Zaghouan ili konstruis grandegan „Akvo-templon", kiu kolektas ĉiujn fontojn de la Djebel-



Tute indiferenta ŝajnas resti la praromana ponto de Djédéïda, malgraŭ la terura Medjerdaha ŝveliĝo.

Zaghouan (la monto Zaghouan). 90 kilometrojn longa akvokondukilego kondukis la akvon de Zaghouan al Karthago. Apud Tunizo la arkaĵoj de tiu aera akvokondukilego estas dek metrojn altaj.

Grandaj baraĵoj estis konstruitaj ankaŭ en Kasserine kaj en Djebel—Oust.

La romanoj kreis en Nordafriko vastan reton de vojoj. Oni trovas romanajn vojojn de Krumirio ĝis la mezo de Sahara. Fortaj pontoj permesis pasi la riverojn. Ankoraŭ hodiaŭ la romana ponto de Djédéïda staras firme, malgraŭ la ĉiujaraj ŝveliĝoj de la Médjerda-rivero kaj la dummilitaj bombardadoj.

La romanoj avidis la gladiatorajn turnirojn. Tiucele ili konstruis en El-djem grandegan amfiteatron. Por doni al vi komprenon pri la grandeco de tiu konstruaĵo jen kelkaj ciferoj. Laŭ la plej granda dimensio ĝi estas 150 metrojn longa kaj 36 metrojn alta. Sesdek mil rigardantoj povis facile kunveni. Gordien elektis tiun lokon por esti proklamata imperiestro.

Verajn miraklojn la romanoj plenumis en „Terra Africa". En tiu senarba lando ili kreskigis la plej grandan olivarbaron de la tuta mondo.

Malgraŭ la granda manko de akvo, ili efektivigis grandiozan irigacisistemon. Oni prave povas aserti, ke Tunizio konis sian plej prosperan epokon dum la roma okupado. Bedaŭrinde la vandaloj, la bizancanoj kaj la nilalaj araboj sovaĝe detruis la latinan laboraĵon kaj nenion ili kapablis rekonstrui aŭ krei.

André Secco, Tunizio.

## FRANCA JUNULARDOMO.

Ĉu ekzistas en via urbo tiel nomata junulardomo?

Ni parolos hodiaŭ pri modela junulardomo: la junulardomo de Croix. Croix estas urbeto apud Roubaix.

„Nekapablaj estas la nunaj gejunuloj", estas ĝenerala aserto. Tamen vi mem juĝu:

Tuj post la fino de la lasta milito en Croix malfermiĝis junulardomo nun modela. Ĝiaj multnombraj kaj diversaj aktivaĵoj havas ĉiuj unu celon: distri, sed samtempe ankaŭ kunigi ĉiuopiniajn gejunulojn.

En la legoĉambro troviĝas ĉiaj gazetoj kaj revuoj; fakte la biblioteko estas unu el la plej gravaj fakoj de la domo; ĝi entenas klasikajn kaj modernajn romanojn, ankaŭ teknikajn verkaĵojn popularajn.

Sed ankaŭ aliaj sekcioj estas aktivaj: desegnado, radio-elektrotekniko, filatelo, lingvoj; okazas eĉ elementa kurso de la franca lingvo por la multnombraj nordafrikanoj, kiuj loĝas en la urbo.

Dum la kunvenoj de la studrondoj oni ĉiam diskutas tre amike pri la plej

diversaj temoj: vojaĝintoj rakontas pri siaj aventuroj: Italujo, Usono, Sovet-Unio, Berlino, k.t.p. kaj kredu min, kiam mi diras, ke post la paroladoj ne mankas demandoj.

La sekcio „Ludoj" posedas tablotenisojn tre ŝatatajn de la gejunuloj, ankaŭ ŝaktabulojn, bilardojn k.t.p.

Kompreneble la hejmo prezentas al siaj membroj ĉiusemajne filmojn, kiujn la gejunuloj mem kritikas.


Kaj — kiuj personoj estras tiun junulardomon?

Ve! La gejunuloj mem! Sub gvidado tamen de tre komprenema juna instruisto.

Imitinda ekzemplo, ĉu ne? [1])

Lucien Giloteaux, Croix, Norda Francujo.

(El la ĉiulunda paroladeto en Esperanto de Radio Lille (234 m), je la 8-a h. 45 min. (M.E.T.).




## I.L.E.I.-RUBRIKO.

*(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned. Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).*

En **Nederlando** la oficejo, kiu prizorgas speciale la propagandon por Esperanto en la lernejojn, estas tre aktiva. Ĝi okazigis en la pasinta somero porinstruistan kurson. Krome ĝi sendis bone argumentitan petskribon al la Ĉambro de Deputitoj por meti Esperanton inter la devigajn fakojn de porinstruistaj seminarioj.

Ĵus, en oktobro 1950-a, Esperanto estis oficiale akceptata inter la fakoj de la Amsterdama Universitato. Lektoro estas nia konata samideano S. Pragano.

**La Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj** aranĝas Paskan Lernejon en Folkestone, bela marborda urbo, de la 24-a ĝis la 31-a de marto, 1951-a.

Ili kore akceptas alilandajn gekolegojn. Restas lokoj je kosto de £ 5-5-0 plus enirpago de kvin ŝilingoj. Post la 28-a de februaro oni akceptos ne-instruistojn, se restos lokoj. Sed iuokaze estas nepre necese skribi tuj kaj rezervi. Pli da detaloj kontraŭ respondkupono de f-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Birmingham 30, Anglujo.

**Informoj de la Oficejo „Esperanto ĉe la instruado** (Amsterdam, Ned.).

**Statistiko.** — Same kiel antaŭajn jarojn ni dissendis demandlistojn al la de ni konataj geinstruistoj de Esperanto-kursoj en lernejoj. Ni urĝe petas ĉiujn gelegantojn, ke ili konvinku sin, ke ĉiu kursgvidant(in)o ricevis nian formularon. Oni zorgu, ke ĝi estu resendata kompletigita. Se vi spertas, ke iu instruisto, kiu bezonas la demandfolion, ne ricevis ĝin, bonvolu havigi lian (ŝian) adreson al ni. Ĝuste nun tre gravas, ke nia statistiko estu kompleta kaj fidinda.

**Porinstruista Kurso.** — Kun granda ĝojo ni komunikas, ke denove nia oficejo aranĝos komencan kurson por geinstruistoj kaj geprofesoroj.

[1]) Certege! — Sed kiel oni financas tian junulardomon??? — Red.

Ĝi okazos en la konferencejo „Weltevreden" en Kerk-Avezaath, apud Tiel (Nederlando). La kurso estos de la 30-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto. Kursmono 12.— guld.; restado kaj manĝoj senpagaj. Prospekto kun ĉiuj necesaj informoj aperos, sed interesiĝantoj jam nun petu alsendon.

P. W. Baas, C. Krusemanstr. 43111, Amsterdam.

**Alvoko:** Gekolegoj kaj geamikoj, bonvolu sendi al mi lernantajn artikolojn kaj desegnaĵojn, kiuj montras la valoron de internacia helplingvo kaj kiuj esprimas vian pretecon amikiĝi kun germana popolo, kun la Germana Demokrata Respubliko.

Ankaŭ geografiaj, naturscienceaj, historiaj, socisciencaj artikoloj (eble el lernejaj murgazetoj) kaj raportoj pri internaciaj, Esperantaj renkontiĝoj kaj tendaroj estos bonvenaj, same kiel semeroj por la lerneja ĝardeno, k.t.p. Ni laŭeble rekompencos per raportoj pri la observoj en nia Miĉurin-lernejĝardeno. (Ĉu vi konas la ideojn de la sovetaj biologoj Miĉurin kaj Lyssenko? Ĉu vi scias, kio estas „jarovisacio"? Do, mi klarigos tion al vi!)

Mi estas preta kolekti tiujn dokumentojn, prezenti kaj interpreti ilin al nia ministro por popoledukado. Speciale grava kaj efika estas la kunhelpo de gekolegoj el la popoldemokrataj landoj.

Do, gekolegoj kaj amikoj en la tuta mondo, helpu amase! De via kunlaboro dependos la sukceso de nia poresperanta lukto.

Mi promesas raporti pri nia sukceso (aŭ malsukceso) antaŭ la 1-a de septembro 1951-a.

Kun kolegaj salutoj kaj antaŭdanko, via

Josef Steppan, Kahla-Thür, Rudolfstädterstr. 1 (D.D.R.)

**La redakcio komunikas:** Ĵus aliĝis al I.L.E.I. la Finnlanda Instruista Asocio. Koran bonvenon al nia 6-a landa grupo! Kiu estos la 7-a?

---

## Karaj Lernejanoj,

Jen ree komencis nova jaro. Ĉu vi havis agrablan ferion?

Sed vi ne estis tre diligentaj, ĉar mi ricevis nur unu verkaĵon! Kie restas la aliaj?


Nur Audry Price faris verkaĵon por ni. Ŝi kribis pri sia Esperanto-klubo en Tinker's Farm-lernejo. En ĉi tiu numero vi ĉiuj povas legi ĝin. Ĉu en aliaj lernejoj ankaŭ estas tiaj kluboj? Vi ne respondis al nia demando en la oktobra numero. Nun ni nur scias, ke estas kluboj en Oldham kaj en Northfield (ambaŭ en Britujo). Sed ja certe estas pli da junularkluboj! Aŭ ĉu la aliaj landoj dormas???

Bone legu ankaŭ la verkaĵon de Byron Smith, pri la presado de lerneja gazeto. Byron, ĉu via gazeto estas nur angla, aŭ ĉu ĝi enhavas ankaŭ Esperanton? Volonte ni iam vidus ĝin. Ĉu vi povas sendi ekzempleron al ni? (Adreso: TJO-Centro, West-Graftdijk, Nederlando). En multaj lernejoj oni nun faras gazetojn kaj estos interese, kompari ilin.

# NIA VERKILO.




Vi skribas leteron.
Rakontu: kion vi faras?





1.











2.




3.



4.

Kion faras la poŝtisto?



5.



6.



7.

Ĉu la poŝtisto portos al mi vian leteron?

Mia adreso estas: s-ro P. Korte, Schoolstraat 13, **Veendam.** Nederlando.


---

De tri knaboj kaj kvar knabinoj de la Saint-Michael's School, Bournemouth (Anglujo) mi ricevis belajn kartojn kun bondeziroj okaze de Kristnasko. Koran dankon, karaj junaj geamikoj!

Ĉu vi ricevis miajn kartojn? Ili estas faritaj de tre junaj geknaboj en mia lernejo. Sed ili ne komprenas Esperanton kiel vi.

P. Korte.

## Striks, la Flameo.



Ĉu vi scias, kiu mi estas? Mi estas Striks, la strigo, kun la dimanĉa nomo „Flameo".

Ĉu vi konas min?

Mi loĝas sur preĝejoj. Pli bone: mi loĝas sur la Granda Preĝejo de Edamo, urbeto en Nederlando, apud Amsterdamo.

En parto de Nederlando mi nomiĝas: kadavro-strigo.

Mi loĝas sur preĝejoj. Ĉirkaŭ multaj preĝejoj en Nederlando oni trovas tombejojn. Tial mi kelkloke nomiĝas kadavro-strigo. Malbele, ĉu ne?

La homoj diras, ke ni, strigoj, ne povas vidi, kiam la suno brilas. Tio estas fabelo. Dumtage ni volonte ripozas, ĉar tiam ankaŭ la musoj ripozas kaj ni ne povas kapti ilin.

Kiam estas mallume, tute mallume, mi ne povas vidi ion. Feliĉe oni trovas ĉie, kiam ajn, iom da lumo. Tial mi tiam povas flugi kaj kapti mian nutraĵon.

(Daŭrigota). El la lerneja gazeto de Edam (Ned.)

## Nia Lerneja Parlamento.

En nia lernejo ni havas kopion de la angla parlamento kaj la knaboj estas la parlamentanoj. Ni havas ĉefministron kaj kvin aliajn ministrojn. Ni havas ankaŭ prezidanton kaj skribiston. La knaboj ekstaras, kiam la prezidanto envenas. La skribisto legas pri la pasinta kunveno. Poste la ministroj respondas al la demandoj kaj legas siajn raportojn. Post la raportoj ni diskutas pri leĝproponoj.

Donald Mudd (15-j.) Elleston Sec. County School, Cleethorpes, Britujo.

## Pri „Kristnasko".

Kristnasko estas la festo de la amo kaj ĝojo. Jam longe antaŭ ĝi laboras diligentaj manoj, ĉar ĉiu volas gajigi siajn karulojn.

„Johano", mi diris, „iru kun mi al lignaĵisto, ĉar mi volus fari ion por miaj gepatroj.

La mastro serĉis por ni belan tabulon. Nun ni serĉis segileton kaj gluaĵon. Por la patrino mi faris tabulon por la ŝlosiloj kaj por la patro belan skatolon por tabako. Ni laboris kaŝe, por ke la gepatroj ne rimarku, kion ni faras.

Vespere, dum la krepusko, kiam la patrino havas liberan tempon, ŝi rakontas kristnaskajn fabelojn, kaj ni kantas kristnaskajn kantojn, kiel „Abio vi, abio vi", „Sankta nokto" k.t.p. Iun tagon la patrino bakas diversajn bakaĵojn kiel stelojn, ringojn, korojn k.t.p. Ankaŭ mi povas helpi ĉe tio. Tio estas bela tempo. Kiam ĉiuj bakaĵoj bone odoras, ni apenaŭ povas atendi la sanktan vesperon (24/12), tiel ekscititaj ni estas. Kiam oni iras tra la urbo, oni povas vidi la kristnaskajn elmontrejojn.

La kristnaska tempo estas tre bela kaj mistera. Sed ni ne forgesu la malriĉulojn kaj forpelitojn en nia urbo. Mi konas malgrandan, malriĉan knabon kaj mi faris por li veturileton.

Baldaŭ finiĝas la antaŭkristnaskaj tagoj. Se dum la Sankta Vespero la sonoriloj sonoros kaj la kandeloj lumos sur la kristnaska abio, venos multe da ĝojo kaj amo en la koron de la homoj kaj espereble ankaŭ paco sur la teron. Dum la lastjara silvestro (= 31/12) mi verŝis el plumbo (t.e. silvestra kutimo en Germanujo, por ke oni antaŭvidu la estontecon) objekton, kiu similis al kolombo.

Verkis D. Sturm (12-jara lernanto de Josef Steppmann, Kahla/Thur, Germanujo).

## Ruzaj enigmoj.

1. Kiam restas dek, se oni prenas dek de dek?
2. Se 6 homoj fumas dum 6 minutoj 6 cigaredojn, ĉu tiam 606 homoj fumas 606 cigaredojn en 606 minutoj?

P. B., Budapest, Hungarujo.

## La „Elliston Echo" (la eĥo de Elliston).

En nia lernejo ni havas ĵurnaleton. Ĝi nomiĝas la „Elliston Echo" kaj mi estas la redaktisto. Ĝi estas tre interesa.

Unue ni aranĝas la vortojn en presliteraro kaj poste ni metas la

vortojn en metala kadro. Kiam ni finis tion, ni presas ĝin, por vidi ĉu estas eraroj. Se estas eraroj, ni korektas ilin. Ni nomas tion presprovaĵo.

Poste ni metas la rulojn sur la presilon kaj ni metas inkon sur pecon de metalo, kiu estas super la ruloj. Kiam ni finis tion, ni metas la preskadron en la presilon kaj ni ŝraŭbas ĝin tre, tre streĉe.

La ruloj iras sur la peco de metalo kie estas la inko, rulas sur la presliteroj en la preskadro kaj inkas ilin. Tiam la papero iras sur la presliterojn kaj oni presas per la presmaŝino.

Ĝi estas interesa, ĉu ne?

Byron Smith (14-j.), Elliston Secondary Mod. School, Cleethorpes, Anglujo.

## El letero de Finna knabo al siaj francaj korespondantoj:

Kion signifas, ke la infanoj metas ŝuojn antaŭ la kameno je la tago antaŭ kristnasko? Via kristnaska patro ŝajnas esti egala al nia koboldo. Li vizitas hejmojn vespere. Li alportas donacojn, kiel ekzemple skiojn, glitveturilojn, librojn, ludilojn. Ni ne havas noktomezan meson.

Ĉi tie falis malmulte da neĝo en ĉi tiu jaro [1]), proksimume 50 cm. Sed la neĝo restas multajn monatojn.

Mi havas longan vojon al la lernejo: 4 kilometrojn. La duonan parton de ĝi mi iras sur la lago. Sed baldaŭ mi iros per skioj.

Pertti Luostarinen Pyylinsaari, Finnlando.

## Raporto pri mia Esperanto-klubo.

En nia popollernejo de Tinker's Farm, Northfield, Birmingham, Anglujo, ni havas Esperantan klubon, kiu kunvenas marde, ĉiusemajne.

La anoj kunvenas post la lernejaj horoj de la kvara kaj duono kaj la klubo daŭras ĝis la kvina kaj duono.

Audrey Price estas la prezidanto, Pearl Cawston la vicprezidanto, Muriel Brookes estas la sekretario kaj Sheila Price estas la kasisto.

Ni pagas semajne duonpencon. Dum la horo ni kantas, ludas kaj legas libron, kies nomo estas „Kudlago".

Ni esperas viziti la Internacian Junular-Kongreson en la somero.

La klubknabinoj havas dek du ĝis dek kvin jarojn.

Audrey Price (prezidanto).

---

[1]) La letero estas de la antaŭa jaro — Red.

## Aveto kaj la urso (Rakonto el Siberio).

Karaj amikoj, vi certe malofte aŭdas rakonteton el Siberio. Nu, mi legis unu en hungara gazeto kaj mi provos rerakonti ĝin al vi:

En siberia vilaĝeto, apud grandega arbaro, en kiu vivas sovaĝaj bestoj, eĉ ursoj, maljuna hometo rakontis ĝin. Ĉiuj nomis lin „aveto". Li estis eble jam pli ol centjara. En tiu regiono okazas, ke homoj vivas tiom longe. Li ĉiam rakontis pri siaj interesaj kaj strangaj aventuroj. Oni devis kredi al li, ja diris aveto. Kaj li spertis multon dum sia vivo!

Foje li iris al la praarbaro por haki arbon. Li elektis dikan, grandan arbon kaj komencis lerte haki per sia hakilo. Sed kio okazis? Subite li sentis, ke iu tuŝas lin en la dorso. Unue li pensis, ke iu homo faras ŝercon kaj volas ĉirkaŭpreni lin. Sed kiam li turnis sin — ho sankta Dio! Kia surprizo: tie staris juna urso sur la malantaŭaj piedoj. Aveto ne sciis, ĉu ĝi deziras ludi kun li, aŭ ataki lin. Senhezite li pretigis sin por lukti kun la urso. Sed tiu subite turnis sin, aveto faletis kaj falis rekte sur la dorson de la besto. Instinkte li per ambaŭ manoj kaptis la orelojn de la urso. Tiu — eble pro ektimo — komencis kuri kaj — aveto rajdis sur la dorso de la besto. La urso kuris tre rapide kaj aveto baldaŭ rimarkis, ke ĝi iras dekstren, se li pli forte tiras la dekstran orelon. Kaj se li pli forte tiras la maldekstran orelon, ĝi iras maldekstren.

„Bone!" li pensis. Li tiel direktis la beston kaj ĝi kuris rekte al la vilaĝo de aveto.

„Kia spektaklo," li pensis „kiam la vilaĝanoj vidas min enrajdi sur la dorso de urso!"

Li antaŭe ĝojegis kaj fieris pri tia sukceso. Sed — kio okazis? Antaŭ la vilaĝo la urso faletis ĉe iu kavaĵo kaj — „hopla!" aveto falis de ĝia dorso. Kiam li ekstaris, la urso jam kuris malproksime, returnen al la arbaro.

Jen la rakonto de aveto! Vi ja devas kredi ĝin! Kaj ankaŭ instruon ĝi donas al vi: Lerte eluzu ĉiun okazon, sed ne estu tro memfida kaj ne fieru pri io, kion vi ankoraŭ ne tute plenumis.

P. B., Budapest, Hungarujo.

## KONKURSRUBRIKO.

**Raportoj:**

**I.** Mi ricevis 21 provojn el Tinker's Farm (Anglujo), Hilversum (Nederlando) kaj unu de plenaĝulo en Germanujo. La premion gajnis **Eileen Laight**

(Tinker's Farm), sed multaj estis bonaj. Mi gratulas ĉiujn, aparte la junajn provantojn en Hilversum.

A. E. Booy.

**II.** Neniu raporto ricevita.

**III.** Mi bedaŭras, ke nur anglaj gejunuloj partoprenis. En la nova jaro esperEble multe pli da personoj sendos provojn al mi. La premion gajnis **Enid Lloyd** (Birmingham).

I. G. Robins.

**Novaj konkursoj:**

**I.** (ĝis unujara lernado): Skribu kelkajn frazojn pri: Kristnasko, la vetero, donacoj, ludoj, kantoj k.t.p.

Sendu vian provon antaŭ la **10-a de marto** al: f-ino A. E. Booy, 96 Mansel Road, Birmingham 10, Britujo.

**III.** (por ĉiuj): „Kio Ĝi Estas?". Priskribu objekton, sed ne menciu ĝian nomon kaj lasu nin diveni ĝin.

Sendu vian provon antaŭ la **10-a de marto** al f-ino I. G. Robins, 64 Aldridge Road, Birmingham 22B., Britujo.

**Respondoj de la ruzaj enigmoj:** 1. Kiam oni demetas gantojn. 2. Ne, en 6 minutoj.




**en Haarlem, Nederlando (26/7-2/8-1951).**

## La unuaj reagoj:

**Germanujo:** Amiko **Logeman** en Bremen: Rapide sendu al mi **10** aliĝilojn! **Leonie Müller** en Offenburg: Ankoraŭ 237 tagojn!

**Jugoslavujo: Kralj Drago** en Ljubljana: Ni intencas veni kun pli granda grupo al Harlemo. Grupo de esperantistoj en la urbeto Kranj, kiuj ankaŭ intencas veni, jam preparas sin por vigla kultura programo.

**Francujo: S-ro Omont:** Mi starigos karavanon por ĉeesti la IJKn en Haarlem.

**Anglujo: F-ino Rees:** Mi ĝojis aŭdi, ke vi sukcesis aranĝi la IJKn en Haarlem.

**Nederlando: C. Geurts:** Rapidu! La neforgesebla ferio povos esti ankaŭ por vi, sed komprenu: ni povos disponi pri nur 300 lokoj.

Sendu vian aliĝilon al s-ro Geurts, M.Tinxgracht 10, Edam. Kiu preparas programero(j) por la festvesperoj jam nun bonvolu interrilati kun Helmi Veldhuyzen, Hof, v. Delftlaan 79, Delft.

## POŜTMARKRUBRIKO.

Denove f-ino M. Devos surprizis nin per 300 belgaj poŝtmarkoj. Ni rekompence sendis aliajn.

S-ro B. Titon el Parizo sendis 100 francajn p.-m. Ankaŭ al li ni sendis 100 p.-m. de diversaj landoj. Koran dankon!

Kiu sekvos? Ni interŝanĝas ĉiujn kvantojn!

Ni ricevis kvar petojn:

1. Kiu el niaj gelegantoj povos kaj volos sendi al ni p.-m. kun bildoj de bestoj aŭ plantoj?
2. Kiuj el niaj ge-legantoj konas libreton pri la kolektado de p.-m. kun plantoj aŭ bestoj?
3. Kiu el niaj gelegantoj povos donaci al ni katalogon poŝtmarkan?
4. Kiu lernejo volos interŝanĝi kun ni grandajn kvantojn da p.-m.?

Tiujn kvar petojn ni ricevis de nederlanda lernejo, kiu nepre sendos al vi baldaŭan respondon.

Libro-Servo, Edam, Ned.

## SKOLTA RUBRIKO.

### Propagando per ludo.

Jen propaganda ludo, kiun oni povas ludi kun du rotoj aŭ pli. Necesas, ke unu roto enhavu almenaŭ unu esperantiston. Tiu ĉi roto estos grupo da esplorantoj, kiu trairos afrikan arbaron. La alia roto estos grupo da indiĝenaj pioniroj, kiuj scias nur, ke, se necese, alilandaj esplorantoj signalos al ili la literojn S.O.S. per radio (fakte per trumpeto).

Mi nun imagas, ke ni ĉeestas la plenumon de la ludo. La esplorantoj estas for, sed ili lasis postsignojn sur la sekvita vojo. Subite la pioniroj aŭdas la literojn S.O.S. kaj ili foriras por helpi la esplorantojn. Ili sekvas la signojn kaj trovas leteron skribitan de la estro de la esplorantoj.

Kia lingvo estas do uzita? Feliĉe la letero enhavas „ŝlosilon de Esperanto" kaj dank' al ĝi la pioniroj kapablas kompreni la mallongan leteron.

Se estas tri rotoj, la tria povas esti la „Ruĝa Kruco". Oni povas ludi ankaŭ kun nur unu roto de sep aŭ ok skoltoj, sendante nur du esplorantojn. Necesas supozi, ke la grupoj estas diverslingvaj.

Zigzaganta Hipoptamo.

## Voĉo el nia legantaro.

Mégrine (Tunizio), 11/12/'50.

......... Mi ŝatus legi en LJV artikolojn pri aliaj landoj. Ĉu ne ekzistas Finna kamarado, sufiĉe kuraĝa, por verki ion pri la belegaj lagoj en Finnlando? Ĉu la germanoj ne povas verki pri la Nigra Arbaro? Ĉu la angloj dormas? Ĉu la francoj ne interesiĝas pri sia gazeto? .........

André Secco.

# T.J.O.-RUBRIKO.

*(Sekretariino: Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Nederlando).*

Nun ankaŭ Jugoslavujo havas ĉefperanton: S-ro Kralj Drago, Rozna Dolina 6-22, Ljubljana, prenis sur sin la taskon reprezenti T.J.O.-n en sia lando. Ni deziras al li sukcesplenan laboron!

Nia aŭstra ĉefperanto, s-ro Hilkersberger raportas, ke li dum la pasinta somero gastigis en sia gastejo Frataro pli ol 100 esperantistojn, inter kiuj estis multaj TJO-anoj. La ge-samideanoj venis el 14 diversaj landoj.

Ni alvokas ĉiujn, precipe la ĉefperantojn sendi ĉiujn sciigojn pri sia agado sur la verda kampo al la sekretariino!!

Denove ni **urĝe** petas niajn ĉefperantojn poŝtrevene interrilati kun nia kasisto (G. Timmerman, J. Oldenburglaan 17 a, Bergen,/NH), pri la transigo de mono. Al lia lasta peto respondis nur s-ro Schaedel, (kiu ricevos pluajn informojn).

La estraro proponas je la 1-a de julio plialtigi la kotizon ĝis 3 guld. (aŭ egalvaloro) jare. La preskostoj devigas nin al tio.

# KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Aŭstralio:** Bohuslav Kostinek ree dez.kor. kun l.t.m. pri historio, kulturaj kaj politikaj aferoj. c/o L.D.H., Turramurra (NSW).

**Aŭstrujo:** 22 knabinoj, 12-15-j., dez.kor. p.bildkartoj, k.knabinoj en ĉ.l. Skribu al s-ro Gschanes, Vieno 16, Abelgasse 29 (ĉeflernejo).

**Bulgarujo:** Josif Nikolov Arsirov, str. „Plovdivska" 2, Assenovgrad, dez. kor.pri div. temoj k.interŝ. il.poŝstkartojn kun la tuta mondo.

Georgi St. Kokalanov, str. „Carigradska" 54, Bourgas, dez.kor. angle, france, ruse, bulgare, esperante. Interŝ. stampitajn kaj nestampitajn p.m.

Nikola Kolevski, v. Lehĉevo, Mihajlovgradsko, (20-jara), dez. kor. kun la tuta mondo.

**Ĉehoslovakujo:** S-ro Jos. Vild, Rokycany 116/II, interŝ. p.m. k. poŝtkartojn. Skribu multnombre. Respondo certa.

Jarmila Freibergová, instruistino de antaŭlernejo, Straŝice u Rokycan, dez. interŝ. p.m., pk., infanajn desegnajojn de antaŭlernejoj.

**Francujo:** Junulinoj en la Moderna Kolegio en Luçon (Vendée), deziras korespondi kun hispanaj gesamideanoj.

Koresponda Servo de G.E.E. petas adresojn de junaj gesamideanoj por francaj ge-lernantoj kaj laŭeble adresojn de geinstruistoj en la tuta mondo. S-ino Gaillard, Chateau-Larcher, Vienne.

**Jugoslavujo:** Kiu deziras kor. kun jugoslava samidean(in)o skribu al Junulara Esperanto-Sekcio, Ljubljana, Miklošičeva 7.

## Mono necesas.

Por aperigi „La Juna Vivo"n ja necesas mono. Tial ni ankoraŭfoje petas: se vi ne jam pagis vian kotizon por la jaro 1951-a, faru tion kiom eble plej baldaŭ! En la suba listo vi vidas, ke en diversaj landoj momente ne estas ĉefperantoj. Abonantoj en tiuj landoj mem esploru la eblojn por pagi (per respondkuponoj, 5-13 ekz.; pere de la poŝto aŭ per Unesco-kuponoj).

**Hungaroj** klopodu aboni LJVn pere de „Gazetfako de IBUSZ, Budapest V., Akadémia u 10. Ili aldonu, ke la jarkotizo sumiĝas 2,50 nederl. guld. Ibusz poste informos, kiom ili pagu en hungara mono.

**Nederlandanoj,** kiuj pagas ĝire, menciu sur la ĝirilo krom la numeron 382363 kaj la nomon TJO-Centro, ankaŭ la personan nomon N. Kool, ĉar kelkfoje la ĝiroservo malakceptas ĝirilojn, sur kiuj mankas tiu persona nomo. — Post la unua de februaro ni prezentos poŝtkvitancojn. Do post tiu dato nederlandanoj ne plu mem ĝiru.

### Perantoj kaj kotizoj.

(La unua sumo rilatas la kotizon de la 8-p. organo (do por asp. TJO-anoj); la dua la kotizon por abonantoj, aktivaj- kaj subt. TJO-anoj).

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Aŭstralio:** | Fr. Halls, 59 Nepean Highway, Elsternwick S 4, Melbourne ..................... | ŝ. 2.50 | ŝ. 6.— |
| **Aŭstrujo:** | Alois Hilkersberger, Landeck, Lötzweg 1, Tirol, Poŝtŝparkonto 195356 ........ | ŝ. 8.— | ŝ. 20.— |
| **Belgujo:** | Ph. Cullus, 13 rue Chopin, Anderlecht-Bruxelles, ĝironumero 806765 ......... | fr. 16.— | fr. 40.— |
| **Britujo:** | F-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Nr. Neath, S. Wales .................... | ŝ. 2.— | ŝ. 5.— |
| **Danujo:** | Kaj Pedersen, Brøhnshøjvej 62, Brønshøj, Ĝironumero 73478 ........... | kr. 2.— | kr. 5.— |
| **Finnlando:** | Eld. Vilho Setälä, Onentie, 23, Helsinki-kä ........................................ | fmk. 75.— | fmk. 185.— |
| **Francujo:** | Roger Bizet, Wierre au Bois par Samar, P. d. C., ĝironumero Lille 182135 ... | fr. 100.— | fr. 250.— |
| **Germanujo:** | Günther Schaedel, München 22, Kaulbachstr. 61, ĝironumero München 92299 ........................................ | DM. 1.50 | DM. 3.50 |
| **Hispanujo:** | J. L. Ballesteros, Lista de Correos, Madrid. M. Montserrat, Strato Provenza 75, Barcelona ............................ | pes. 13.— | pes. 32.— |
| **Jugoslavujo:** | Kralj Drago, Rozna Dolina 6-22, Ljubljana ........................................ | | |
| **Maroko:** | Ben Sion Ohana, Rue de la Kashba 1, Marrakech, ĝironumero „Rabat" c/c 368.92 ........................................ | fr.fr. 100.- | fr.fr. 250.- |
| **Polujo:** | Benedict Palczynski, Reda k.Gdynia ... | zl. 400.— | zl. 1000.— |
| **Svedujo:** | Esperanto-Fölagsföreningen, Fack 19071, Stockholm .................................. | kr. 1.62 | kr. 4.— |
| **Usono:** | E.A.N.A., 114 West 16th Str., New Yrok II, N.Y. ................................ | dol. 0.40 | dol. 1.— |

---

**Por 1 guld. vi povas ricevi de TJO-Libro-Servo, M.Tinxgracht 10, Edam, Nederlando, 10 diversajn Esperanto-gazetojn!**